



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Karboekspluanta Distrikto Rosice-Oslavany

Prelegos: Oldřich Arnošt Fischer

Permia-karbonia sulko de Boskovice enhavis trovaĵojn de ŝtonkarbo, grafito kaj aliaj utilaj minaĵoj kaj mineraloj. Karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany (80 × 5 km) pli ol 230 jaroj signife influis vivon en regiono, donis laboron al multe da homoj kaj kontribuis al evoluo de industria urbo Brno. Jam mezepokaj regantoj ministrojn subtenis. Tie oni minis kupron, feron, grafiton, alunan ardezon, sabloŝtonon, magneziton, sepioliton, eksperimente galeniton kaj eĉ arĝenton. Ŝtonkarba minejo Jindřich II en Zbýšov (1 428 m) estis la plej profunda minejo de eksa Ĉeĥoslovakio kaj tuta Eŭropo. Laboro de ministroj estis pena, en minejoj okazis akcidentoj, ministroj multfoje strikis. Minado de ŝtonkarbo finis la 18-an de februaro 1992. Moravia poeto kaj verkisto Mirek Elpl (propranome Eduard Elpl, 1905 – 1960) el Brno-Líšeň estis mineja inĝeniero, kiu bone sciis vivon en la regiono kaj laboron en minejoj.

Rakonton pri vivkondiĉoj de ministroj akompanas rememoroj de homoj el ministaj familioj, kiuj en la regiono vivis dum erao de minado de ŝtonkarbo.

Ĉeesta programo, ne estos elsendata rete. Ĝi estas registrita.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 29-an de marto 2023 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Ni rekomendas

- 29 de julio — 5 de aŭgusto 2023 **Universala kongreso**, Torino, Italio
- 5 – 12 aŭgusto 2023 **Kongreso KELI**, Bjalistoko, Pollando
- **Instruista trejnado, Poznano**. Pli de informojn vi povas legi en artikolo verkita de Ilona Koutny kaj Katalin Kováts ĉe <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/instruista-trejnado.html>.
- Dujara ĉeesta magistra studado **Linguistics and Information Management** en Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano. Pli da informoj vi trovos ĉe <https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/>.
- Nova libro Tetjana Lohvinovska: **Pensoj pri la Esenco**. 80 paĝoj, tradukis Oldřich Arnošt Fischer. Aĉetebla ĉe butiko@esperantobrna.cz. Kosto 290 CZK (ĉirkaŭ 12 EUR), sendokostoj laŭ lando kaj pezo. Ni sendas nur en EU por eviti dogandeklaron.
- Montru, ke vi regas Esperanton, aliĝu al **KER-ekzameno**. Jam en kvar niveloj: B1, B2, C1 kaj ekde pasinta jaro ankaŭ C2. Retaj ekzamenoj junio (krom C2), ĉeesta ekzameno en Torino la 4-an de aŭgusto. Reta kaj ĉeesta C2 la 4-and de aŭgusto. Pli da infromoj kaj aliĝilo ĉe <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>.



Programo en aprilo

La 5-an **Komenský kaj Zamenhof** – Petr Chrdle, Komuna renkontiĝo kun klubo en Glivice, rete per Zoom

La 12-an **Lingvoj kaj komunikado** – Josef Vojček, Občanský klub, Hybešova 65a

La 19-an **Kion ni legas** – diskuto pri esperantaj libroj, rete per Skajpo

La 26-an *Ankoraŭ ne agordita*, Občanský klub, Hybešova 65a

Mi petas vin, ke vi jam primensu vian proponon por aprila kaj maja programoj. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/@esperantobrna) (<https://www.youtube.com/@esperantobrna>).

Milan Kolka
prezidanto